

ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2021-01-15 ĝis 2021-04-15.

Eventoj

Kongreso-2021

Malfacile survojas preparlaboroj por la kongreso. La temo estas difinita kiel “Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj”. Fine de januaro la Estraro pritaksis kongreskotizojn por eventualaj fizikaj ĉeestontoj. Tiuj kovras la ĝeneralajn kostojn: A-landanoj: 100 EUR, B-landanoj: 80 EUR, C-landanoj: 60 EUR. Estis ellaboritaj kaj aprobitaj afiŝo kaj emblemo por la kongreso. Survojas preparado de la kongresa dutaga simpozio kun la temo “Esperanto - studkampo kaj komunikilo en multlingvaj lernkomunumoj“, pri kiu respondecas Radojica Petrović kunlabore kun la Universitata laborgrupo de CED/ESF/ILEI. La simpozio celas emfazi Esperanton kiel lingvistikan studtemon kaj doni impulson al klerigado per ĝi. En IPR 2021/1 estis publikigita la simpozia alvoko. Jam estis kreita skizo de la detala programo.

Laŭ la peto de la beninaj esperantistoj la Estraro pritaksis la eblon ŝanĝi la lokon de la kongreso de Kotonuo al Lokossa kaj, bedaŭrinde, devis rezigni pro diversaj malfacilaĵoj, kaŭzitaĵoj de KOVIM-19. Do, la planita loko restas Kotonuo. Pretas la ekskursprogramo. La decido pri okazigo de la surloka kunveno okazos en majo laŭ la anoncoj pri partoprenintenco. Ĝis nun tiuj intencoj ne atingas dek.

La Estraro

La Estraro esprimas koran kompaton al la Prezidantino Mireille Grosjean pro ŝiaj hejmaj malfacilaĵoj, kaŭzitaĵoj de incendio, kaj deziras bonstaton en ŝia nova loĝejo!

En 2021 okazos elekto de la Estraro de ILEI. Tio estas planata dum la ILEI-Kongreso – 2021 en Benino, plej verŝajne, dum la virtuala komitatkunsido. El la 7 nunaj estraranoj 3 ne plu kandidatiĝos. ILEI alvokis ĉiujn Esperantistojn, kiuj aprezas celojn kaj agadon de la Ligo kaj pretas kunlabori, por ke ili anoncu sin. La alvoko estis vaste disvastigata tra la kanalo de ILEI, Edukado.net kaj aliaj. La 24-n de januaro la Prezidantino Mireille Grosjean sendis al Unuiĝintaj Nacioj mesaĝon okaze de la Internacia Tago de Edukado, en kiu ŝi substrekas signifajn ŝanĝojn en monda edukado pro novaj teknologioj kaj aliaj defioj. La 21-an de februaro ŝi sendis salutmesaĝon okaze de la Internacia Tago de la gepatra lingvo, tra kutimaj kanaloj de ILEI.

Januare estis sendita la oficiala protestletero de ILEI al la japana kompanio, kiu intencis registri nomon por nova retrevuo kun la vorto 'Esperanto', kvankam ne ligita enhave kun nia lingvo.

En marto la Prezidantino sendis salutmesaĝon al la Irana Kongreso.

Sekcioj

En IPR 2021/1 estis publikigita la aktuala listo de la sekciestroj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj. La Estraro esprimas koran dankon al tiuj, kiu helpis kontroli kaj korekti laŭbezone tiun liston por havi ĝustan informon por la Ligo.

Kapabligo

Por revivigi kaj vigligi ILEI-sekciojn, kiuj dormas, malkreskas k.s. la Prezidantino Mireille Grosjean lanĉis kaj organizis en la unua sabato de ĉiu monato Forumojn por ILEI-gvidantoj (ILEI-sekciestroj, reprezentantoj kaj simple aktivuloj kaj dezirantoj aktivi). La Unua okazis la 6-an de februaro virtuale kun partopreno de 26 personoj. Estis diskutataj la demandoj pri teritorio por sekcio, pri fondo de ILEI-AMIKARO, pri universitataj kursoj de Esperanto, pri la projekto IKIKO lanĉita kaj prizorgata de Vicente Manzano Arrondo pri interkultura komunikado, pri elekto de estraranoj. La partoprenantoj interŝanĝis spertojn, ideojn, planojn. La Dua okazis la 13-an de marto per Zoom kun partopreno de 20 personoj. Temis pri la elektoj de la Estraro en la nuna jaro 2021. La Tria okazis la 3-an de aprilo kaj estis dediĉita al Esperanto Instruista Trejnado. Partoprenis en ĝi deko da personoj.

Universitata agado

La Komisiono pri Universitata Agado plu antaŭeniras en sia laboro sub la gvidado de Radojica Petrovic kaj Ivan Colling. Ili prizorgas la planitan simpozion, kiu okazos kadre de la Kongreso.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

Pro daŭra pandemio kaj problemoj pri sendado flanke de la slovaka poŝto ILEI liveros en 2021 IPR-N parte rete, kiel dum 2020. La Estraro dankas ĉiujn pro kompreno kaj tre esperas, ke la situacio normaliziĝos. La enhavo kaj enpaĝigo daŭre estas elstare kompilata de la redaktoro Jozefo Nemeth.

Juna Amiko (JA)

La Revuo plu aperas regule kaj kun interesa enhavo danke al la valora laboro de la redaktoro Stano Marcek kaj la skipo de la rubrikestroj. Novaj abonantoj anoncas sin.

ILEI en la Reto

Daŭre aperas diversaj aktualaj informoj en kanaloj de ILEI en Fejsbuko, Jutubo.

Kunlaboro kun enmovadaj institucioj

La 10-an de aprilo 2021 okazis la 72-a AMO-seminario kadre de la 8-a Nacia Irana Kongreso. La Prezidantino Mireille Grosjean kaj la vic-prezidanto Ivan Colling preparis 20-minutan prezenton pri ILEI por tiu evento. En la posta diskuto partoprenis estraranoj Unika kaj Ivan Colling. La registraĵo de la Seminario estas disponigata ĉe Jutubo kaj la filmo “ILEI prezentas sin” spekteblas en la Jutuba ILEI-kanalo ĉe la adreso: <https://youtu.be/q-jh3KoP5IU>. Kiel jam kutimas, ILEI estos honora patrono de la 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiuj okazos en majo en la pola urbo Vroclavo sub gvido de nia kara samideanino Małgosia Komarnicka, la Prezidantino de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado.

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI:
Elena Nadikova
Prezidanto de ILEI:
Mireille Grosjean
2021-04-15